

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 16

ISSN 1861-3330

Jun. – Sep. 2006

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Balail-ĵetado en la 18-a de Marto 2006
Besenwerfen am 18. März 2006

Unser Vereins-Besenwerfen vom 18.03.2006 in Rodenkirchen

Unser diesjähriges Besenwerfen fand in Rodenkirchen mit 24 Teilnehmern statt. Mit vollgestopftem Handwagen gingen wir den schneebedeckten Deich entlang zum Restaurant *Friesenheim*. Der neugewählte Festausschuss hatte viele lustige Spiele ausgedacht, um den Weg zu verkürzen. Nach dem Verspeisen des sehr guten Grünkohls losten wir unser Kohlkönigspaar Jutta Wefer und Christoph Gebhards aus. Der Abend endete gemütlich, und alle waren begeistert von dem gelungenen Fest und freuen sich schon auf das nächste Besenwerfen im Juli. Dann werden sogar Gäste aus Sibirien dabeisein. – Anne, Benjamin, Hannelore, Hans Gerd, Ilona, Kerstin

Nia kluba balail-ĵetado en la 18-a de Marto 2006 en Rodenkirchen

Nia ĉijara balail-ĵetado okazis en Rodenkirchen kun 24 partoprenantoj. Kun plenŝtopita manĉaro ni iris laŭ la neĝkovrita digo al restoracio *Friesenheim*. La novelektita festkomitato elpensis multajn gajajn ludojn por malplilongigi la vojon. Post la manĝado de la bonega verdbrasiko ni lotumis nian brasik-reĝparon Jutta



Wefer kaj Christoph Gebhards. La vespero finiĝis hejmece, kaj ĉiuj estis entuziasmaj pri la sukcesa festo kaj jam antaŭĝojas la venontan balail-ĵetadon en Julio. Tiam eĉ partoprenos gastoj el Siberio. – Anne, Benjamin, Hannelore, Hans Gerd, Ilona, Kerstin

*Kun la balailo: Lina /
Mit dem Besen: Lina*

„Wir singen“ – ein musikalischer Gruppenabend der Esperanto-Gruppe Bremen (Bremen, 12.04.2006)

„Esperanto – kann man sich in der Sprache unterhalten?“ Das ist eine manchmal von Nicht-Esperantisten gestellte Frage. Nun, auf Esperanto kann man nicht nur alles sagen, sondern auch sehr schön singen. Das bewiesen acht Mitglieder der Esperanto-Gruppe Bremen und zwei der Esperanto-Gruppe Unterweser während eines musikalischen Gruppenabends. Auf Esperanto sangen wir u. a. bekannte deutsche Volkslieder, z. B. *Alle Vögel sind schon da*, *Am Brunnen vor dem Tore*, *Es klappert die Mühle am rauschenden Bach*, *Das Wandern ist des Müllers Lust*. Hellmut Grebe an der Gitarre und Dr. Hans-Walter Krüger am Klavier begleiteten den Gesang. Wir danken der Bremer Esperanto-Gruppe für den gelungenen Abend. – Andreas, Anne

Prelego pri Esperanto en Bad Bederkesa en la 2-a de Aprilo 2006

De kelkaj jaroj loĝas la esperantistoj Otto Rösemann kaj lia edzino Gertrud en Bad Bederkesa, 20 km oriente de Bremerhaven. Li estas aktiva en la fervojista esperantistaro kaj krome delegito de UEA en Bad Bederkesa. Konatoj estis petintaj de li informojn pri Esperanto. Tio instigis lin kaj lian edzinon fari la germanlingvan prelegon *Verständigung ohne komplizierte Regeln? – Esperanto* (ĉu interkompreniĝo sen komplikaj reguloj? – Esperanto). En ĝi ili klarigis, kio Esperanto estas, kiu iniciatis ĝin kaj kiujn esencajn ecojn ĝi havas. Ili vigle rakontis okazintaĵojn dum siaj vojaĝoj, internaciaj renkontiĝoj kaj amikaj korespondadoj rilate Esperanton kaj ilustris tion ĉi per bildoj. La unuhordaŭra prelego tre interesis la preskaŭ 20 geaŭskultantojn: Ili demandis ekzemple: “Kiel

oni povas lerni Esperanton? Ĉu la por ĝi uzata latina alfabeto eble malhelpas ĝian disvastiĝon en Ĉinujo?” (Tiom pri la opinio de iuj esperantistoj, ke ne-esperantistoj ne interesiĝas pri detaloj kiel la alfabeto) Kun la permeso de la prelegantoj mi atentigis pri la kursoj okazigataj de nia klubo. Kaj mi menciis, ke Ĉinujo estas tiu lando, kies poreksterlanda radioservo disaŭdigas mondvaste la plej multajn Esperanto-programojn permallongonde. La prelegantoj tre ĝojis pri mia ĉeesto. Kaj al mi la unua kontakto kun la esperantistaro de Bad Bederkesa faris grandan plezuron. Kial ne foje ankaŭ tie okazigi klubrenkontiĝon? – Andreas

Vortrag über Esperanto am 02.04.2006 in Bad Bederkesa

Otto Rösemann ist aktiv in der Eisenbahner-Esperantistenschaft und außerdem Esperanto-Weltbund-Delegierter in Bad Bederkesa, 20 km östlich von Bremerhaven. Bekannte hatten ihn um Informationen über Esperanto gebeten. Das regte ihn und seine Frau an, den deutschsprachigen Vortrag *Verständigung ohne komplizierte Regeln? – Esperanto* zu halten. Darin erläuterten sie, was Esperanto ist, wer es ins Leben rief und welche wesentlichen Merkmale es hat. Lebhaft erzählten sie Begebenheiten während ihrer Reisen, internationalen Treffen und Brieffreundschaften im Zusammenhang mit Esperanto und veranschaulichten das mit Bildern. Der einstündige Vortrag interessierte die etwa zwanzig Zuhörer sehr: Sie fragten z. B.: „Wo kann man Esperanto lernen? Ist das lateinische Alphabet, das ja für Esperanto verwendet wird, vielleicht hinderlich für dessen Verbreitung in China?” (So viel zur Meinung mancher Esperantisten, dass Nicht-Esperantisten sich nicht für Einzelheiten wie das Alphabet interessierten) Mit Erlaubnis der Vortragenden verwies ich auf die von unserem Verein veranstalteten Kurse. Und ich erwähnte, dass China das Land ist, dessen Auslandsrundfunk weltweit die meisten Esperanto-Programme auf Kurzwelle ausstrahlt. Die Vortragenden waren sehr erfreut über meine Anwesenheit. Und auch mir bereitete der Erstkontakt mit der Esperantistenschaft von Bad Bederkesa ein großes Vergnügen. Warum nicht auch dort mal ein Vereinstreffen stattfinden lassen? – Andreas

La 83-a Germana Esperanto-Kongreso (Brunsviko, 2-a ĝis 5-a de Junio 2006)

Waltraud, Renate, Anke, Hermann, Günther kaj Udo-Eugen estas komencantoj kaj scivolemaj pri la kongresimpresoj. En la vendredo ili kaj Anne per trajno veturis al Brunsviko al la kongres-hotelo *Mövenpick*, kie ili ankaŭ gastis. Andreas, kiu gastis ĉe sia pli juna frato kaj ties familio ĉirkaŭaĵe de Brunsviko, tien veturis peraŭte. Alke alvojaĝis partvoje per aŭto kaj partvoje per biciklo. Post unua esploro de la urbo ni ĉiuj ĉeestis la interkonan vesperon. Dum ĝi ni surhavis niajn okulfrapajn klub-T-ĉemizojn, kio iĝis interparoltemo. La sekvan tagon ni aŭskultis la prelegon de d-ro Ulrich Lins pri la historio de Germana Esperanto-Asocio kaj partoprenis en la gvidata urborondiro. La pliajn prelegojn

de d-ro Renato Corsetti pri plua agado por Esperanto en EU kaj de d-ro Werner Bormann pri Brunsviko 1906 (tie tiam fondiĝis GEA) kaj 1972 (tie ankaŭ tiam okazis GEK) ĉeestis iuj el ni, dum aliaj promenis tra la mezepoka foiro. Post la festa vespermanĝo amuzis nin dum la balo la litova muzikgrupo *Asorti* per vigla muziko kaj Esperanto-kantoj, je kio la ĉeestantoj dancis. En la dimanĉo iuj el ni ĉeestis la jarĉefkunvenon de GEA. Niaj komencantoj tamen kaptis la okazon por partopreni okminutdaŭran Esperanto-rapidkurson de Hans Welling. Dum la posttagmezaj ekskursoj al la muelejmuzeo de Gifhorn kaj al Herzberg ni vizitis ties kastelon kaj la *Interkulturan Centron Herzberg (ICH)*, kiu tre impresis nin. Dum la internacia vespero ni aŭdis la salutojn kaj gratulojn de la ĉeestantaj reprezentantoj de Esperanto-asocioj de dek kvin landoj. Poste amuzis nin magiisto, kaj ni ĝuis la prezentadon de esperantistoj de Hamburgo, kongresurbo en 2007: Ralph Glomp ĝojigis la publikon per konataj maristo-kantoj en Esperanto. En la lundo Anke, Anne kaj Andreas aŭskultis la prelegon de Zlatko Tišljar pri la lingvoproblemo en EU laŭ la ekzemplo de Jugoslavio. Poste Alke, Anne kaj Andreas ĉeestis la prelegojn de Sebastian Kirf pri varbado kaj reklamo kaj de Andy Kuenzli pri universalaj lingvoj en Svislando. Posttagmeze ni trajnveturis hejmen, Alke tamen unue nur ĝis Verden. De tie ŝi etape pluveturis perbicikle. Andreas, kiu estis kuniginta la kongrespartoprenon kun familia vizito, hejmenveturis peraŭte. La kongreso estis tre agrabla kaj amuza por ni. La hotelo estas tre bela kaj havas bonajn servon kaj ĉambrojn. Brunsviko estas interesa urbo. Ni havas multajn impresojn kaj antaŭĝojas pri la venonta kongreso en Hamburgo. – Waltraud, Renate, Anke, Hermann, Günther, Udo-Eugen, Anne, Alke, Andreas

Kaj jen impresoj de niaj "kongres-debutintoj": *Por ĉiu partoprenanto estis io interesa, ankaŭ por tiuj, kiuj ne havis tiel profundajn konojn de la lingvo. Por ni novuloj kompreneble estis travivaĵo renkonti tiel multajn homojn, kiuj parolas Esperanton. La venonta Germana Esperanto-Kongreso okazos en 2007 en Hamburgo. Klare, ke ni ĉeestos denove, sed kun pli bonaj lingvokonoj. – Waltraud, Renate, Anke, Hermann, Günther, Udo-Eugen*

Der 83. Deutsche Esperanto-Kongress (Braunschweig, 02.-05.06.2006)

Waltraud, Renate, Anke, Hermann, Günther und Udo-Eugen sind Anfänger und waren gespannt auf die Kongresseindrücke. Am Freitag fuhren sie und Anne mit dem Zug nach Braunschweig zum Kongresshotel *Mövenpick*, wo sie auch untergebracht waren. Andreas, der bei seinem jüngeren Bruder und dessen Familie in der Nähe von Braunschweig gastierte, fuhr mit dem Auto dorthin. Alke reiste streckenweise mit dem Auto und streckenweise mit dem Fahrrad an. Nach einer ersten Erkundung der Stadt wohnten wir dem Kennenlernabend bei. Dabei trugen wir unsere auffälligen Vereins-T-Hemden, was Gesprächsthema wurde. Am Folgetag hörten wir den Vortrag von Dr. Ulrich Lins über die Geschichte des Deutschen Esperanto-Bundes und nahmen an der Stadtführung

teil. Den weiteren Vorträgen von Dr. Renato Corsetti über die weitere Betätigung für Esperanto in der EU und von Dr. Werner Bormann über Braunschweig 1906

(dort wurde seinerzeit der Deutsche Esperanto-Bund gegründet) und 1972 (dort fand auch seinerzeit der Deutsche Esperanto-Kongress statt) wohnten einige von uns bei, während andere über den mittelalterlichen Markt spazierten. Nach dem festlichen Abendessen unterhielt uns während des Balls die litauische Musikgruppe *Asorti* mit stimmungsvoller Musik und Esperanto-Liedern, wozu die Anwesenden tanzten. Am Sonntag waren einige von uns bei der Jahreshauptversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes. Unsere Anfänger jedoch nutzten die Gelegenheit, um an einem achtminütigen Esperanto-Schnellkurs von Hans Welling



teilzunehmen. Während der Nachmittagsausflüge zum Mühlenmuseum von Gifhorn und nach Herzberg besuchten wir dessen Burg und das *Interkultura Centro Herzberg (ICH; „Interkulturelles Zentrum Herzberg“)*, das uns sehr beeindruckte. Während des internationalen Abends hörten wir die Grüße und Gratulationen der anwesenden Repräsentanten von Esperanto-Verbänden aus fünfzehn Ländern. Danach amüsierte uns ein Zauberer, und wir genossen die Darbietung der Esperantisten von Hamburg, Kongressstadt 2007: Ralph Glomp erfreute das Publikum mit bekannten Seemannsliedern auf Esperanto. Am Montag hörten Anke, Anne und Alke den Vortrag von Zlatko Tišljär über das Sprachenproblem in der EU am Beispiel Jugoslawiens. Danach waren Alke, Anne und Andreas bei den Vorträgen von Sebastian Kirf über Werbung und Reklame sowie von Andy Kuenzli über universelle Sprachen in der Schweiz. Am Nachmittag fuhren wir mit dem Zug heim, Alke jedoch zunächst nur bis Verden. Von dort fuhr sie in Etappen mit dem Fahrrad weiter. Andreas, der die Kongressteilnahme mit einem Familienbesuch verbunden hatte, fuhr mit dem Auto nach Hause. Das Hotel ist sehr schön und hat eine gute Bedienung und gute Zimmer. Braunschweig ist eine interessante Stadt. Wir haben viele Eindrücke und freuen und auf den nächsten Kongress in Hamburg. – Waltraud, Renate, Anke, Hermann, Günther, Udo-Eugen, Anne, Alke, Andreas

Und hier Eindrücke unserer „Kongress-Debütanten“: *Für jeden Teilnehmer war etwas dabei, auch für diejenigen, die nicht so sattelfest in der Sprache waren. Für uns Neulinge war es natürlich ein Erlebnis, so viele Menschen zu treffen, die Esperanto sprechen. Der nächste Deutsche Esperanto-Kongress ist 2007 in Hamburg. Klar, dass wir wieder dabei sind, aber mit besseren Sprachkenntnissen. – Waltraud, Renate, Anke, Hermann, Günther, Udo-Eugen*

De maldekstre al dekstre: / Von links nach rechts: Anke, Günther, Waltraud, Andreas, Anne, Alke, Renate, Hermann, Udo-Eugen

**“Ni kantas” – muzika grupvespero de la Esperanto-Grupo de Bremeno
(Bremeno, 12-a de Aprilo 2006)**



“Esperanto – ĉu oni povas interparoli en tiu lingvo?” Tio estas demando iafoje metata de ne-esperantistoj. Nu, en Esperanto oni povas ne nur ĉion diri, sed ankaŭ tre bele kanti. Tion pruvis ok membroj de la Esperanto-Grupo de Bremeno kaj du de la Esperanto-Grupo Subvisurgo dum muzika grupvespero. En

Esperanto ni kantis interalie konatajn germanajn popolkantojn, ekzemple *Ĉiuj birdoj venis jam*, *Ĉe l' put' antaŭ pordego*, *Muela rad' turniĝas*, *Migrado mia korplezur'*. Hellmut Grebe ĉe-gitare kaj Dr. Hans-Walter Krüger ĉe-fortepiane akompanis la kantadon. Ni dankas al la Bremena Esperanto-grupo por la sukcesa vespero. – Andreas, Anne

**Ĉe kurs-vespero de la Esperanto-Grupo de Konstanco
(Konstanco, 23-a de Majo 2006)**

Dum mia kvintaga gastado ĉe mia pli maljuna frato en Friedrichshafen mi kaptis la okazon por ĉeesti kurs-vesperon de la Esperanto-Grupo de Konstanco. Krom mi ĉeestis kvin lokaj esperantistoj, el ili Robert Bogenschneider kaj Sandor Stieb (la kurs-gvidanto), kaj la de Zuriko alvojaĝinta plia gasto Martin Meyer. Unue la kursanoj Esperantlingve demandis la du gastojn pri ilia “hejma” Esperanto-situacio. Martin raportis pri Zuriko. Mi rakontis pri la kursoj okazigataj de nia klubo. (Menciindas, ke pri nia klubo agado jam estis raportinta ankaŭ Alke dum sia vizito de unu el la Konstancaj kurs-vesperoj en Septembro 2005.) Poste Sandor daŭrigis la ordinaran programon de l' kurso. Ĉi tiu ĉefe celas komencintojn kun kono de la gramatiko: El la libro *Faktoj kaj fantazioj* de Marjorie Boulton ni kune legis kaj tradukis fabelon de nordamerika indiana tribo. Kiom mi konstatis, niaj kursoj por komencintoj kaj progresintoj diferencas disde la Konstanca kurso ĉefe per jeno: En niaj kursoj estas malpli kune legate kaj tradukate, sed pli instigate paroli libere en Esperanto, tendenco ĝojige rimarkebla precipe dum la lastaj monatoj. Mia ĉeesto de la Konstanca kurs-vespero estis tre bona sperto. Ĝi certe estas profitiga por la plua formado de niaj kursoj. Mi dankas la Konstancajn geesperantistojn por la kora akcepto kaj instrua kaj interesa vespero. – Andreas

Enigmo

	1	2	3	4	14	15
1			4	5		
2			6			
3						
		16	17			
10						
11					8	
12			9			

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de lingvo.

Bei einem Kursabend der Esperanto-Gruppe Konstanz (Konstanz, 23.05.2006)

Während meines fünftägigen Gastaufenthaltes bei meinem älteren Bruder in Friedrichshafen nutzte ich die Gelegenheit, um einem Kursabend der Esperanto-Gruppe Konstanz beizuwohnen. Außer mir waren fünf örtliche Esperantisten zugegen, unter ihnen Robert Bogenschneider und Sandor Stieb (der Kursleiter), sowie der aus Zürich angereiste weitere Gast Martin Meyer. Zunächst fragten die Kursteilnehmer die zwei Gäste auf Esperanto nach deren „heimischer“ Esperanto-Situation. Martin berichtete über Zürich. Ich erzählte von den von unserem Verein veranstalteten Kursen. (Es ist erwähnenswert, dass über unsere Vereinstätigkeit auch schon Alke während ihres Besuches von einem der Kursabende im September 2005 berichtet hatte.) Dann machte Sandor mit dem normalen Ablauf des Kurses weiter. Dieser zielt hauptsächlich auf Anfänger mit Kenntnis der Grammatik ab: Aus dem Buch *Faktoj kaj fantazioj* („Tatsachen und Phantasien“) von Marjorie Boulton lasen und übersetzten wir gemeinsam ein Märchen eines nordamerikanischen Indianerstammes. Soweit ich feststellte, unterscheiden sich unsere Kurse für Anfänger mit Vorkenntnissen und Fortgeschrittene von dem Konstanzer Kurs hauptsächlich durch Folgendes: In unseren Kursen wird weniger gemeinsam gelesen und übersetzt, sondern mehr angeregt, frei auf Esperanto zu sprechen, eine besonders während der letzten Monate erfreulicherweise spürbare Tendenz. Meine Anwesenheit bei einem der Konstanzer Kursabende war eine sehr gute Erfahrung. Daraus kann für die weitere Ausgestaltung unserer Kurse sicher Nutzen gezogen werden. Ich danke den Konstanzer Esperantisten für die herzliche Aufnahme und einen lehrreichen und interessanten Kursabend. – Andreas

Horizontale

1: numeralo; **2:** fare; **3:** planedo [sen finaĵo]; **4:** artikolo [sen apostrofo]; **5:** aŭtosigno de Friedrichshafen; **6:** en flanko parto de granda konstruaĵo; **8:** finaĵo de l' substantivo; **9:** arbospeco [sen finaĵo]; **10:** maldisigi; **11:** tiri malantaŭ si; **12:** pikil-arbo [sen finaĵo].

Vertikale

1: respektinda pro religio; **2:** tre; **3:** birdece eligi altan sonon [sen finaĵo]; **4:** Romio-lingva; **14:** ilo por movi sin en la aero [sen finaĵo]; **15:** tabelvorto [akuzativ-forme]; **16:** aro de multaj domoj kaj stratoj [sen finaĵo]; **17:** maljesi.

Iam en kongresurbo ...

Kongresano: "Ĉu en tiu ĉi urbo estis naskitaj ankaŭ elstaruloj?"

Ĉiĉerono: "Ne, nur malgrandaj infanoj."

Veranstaltungshinweise

Unsere **wöchentliche Esperanto-Übungsstunde für Fortgeschrittene** findet statt **donnerstags** ab 19:45 Uhr in der *Evangelisch-lutherischen Kirchengemeinde Brake*, Kirchenstraße 24, 26919 Brake. Unsere **monatlichen Vereinstreffen** finden statt am **29.06.2006** im *Panorama*, An der Kaje 1 B, 26931 Elsfleth; am **13.09.2006** in der *Weserlust*, Kaje 1, 26919 Brake; am **18.10.2006** im *StadtHotel Oldenburg*, Hauptstr. 36-40, 26122 Oldenburg (je 19:30 Uhr). Unser **Besenwerfen (balail-ĵetado)** ist am **25.07.2006** ab 16:00 Uhr in Rodenkirchen (bitte bei Kerstin oder Mario anmelden). Weiterhin wollen wir unseren Verein auch beim diesjährigen Festzug des **Rodenkirchner Marktes** am **23.09.2006** präsentieren. Unsere **Weihnachtsfeier** ist für den **17.11.2006** geplant. Aktuelles und Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen.

Außerdem:

29.07.-05.08.2006

91. Esperanto-Weltkongress, Florenz, Italien

28.-29.10.2006

Jubiläumsfeier der Esperanto-Gruppe Bremen,
Kalkstraße 6, Bremen

Kiu volas partopreni, bonvolu informi nin.

Impressum:

Zeitschrift:

Erscheinungsweise:

Herausgeber:

Information und Redaktion:

Bankverbindung

(für Beiträge und Spenden):

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)

dreimal jährlich als Druckausgabe und
elektronische Ausgabe, Netzseite:

<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>

Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.

(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,
26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837

Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368

Andreas Kück, Tel.: 04702-5044

Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Raiffeisenbank Oldenburg eG
BLZ 28060228

Kontonummer 1200160000

(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)